

Christian Adolph Overbeck,
Alvenu Maj' kaj donu

tradukita de Bernd Hasecke

Alvenu Maj' kaj donu
Ekvivon al natur'
La teron nun florkronu
Por nia korplezur'!
Ho, baldaŭ ni respiras
Odoron de l' viol':
Tra l' mondo nun vagiras
Kantante la popol'.

Sendube vintro havas
Magion eĉ por hom'.
La neĝo nin tre ravas
Per ĉarma lum-fantom'.
Rapide vi glitŝuas
Sur glata la glaci',
Glitveturadon ĝuas
En blanka neĝo ni!

Sed kiam birdoj restas
Ĉi tie dum somer',
Kaj ni la lumon festas,
Trompravas nin ĥimer'.
Elfloras nun violoj
En nia suna val',
Alflugas la kukoloj
Kaj eĉ la najtingal'.

...

.....

*Traduko de la Germana poemo "Komm lieber Mai und mache" de CHRISTIAN ADOLPH OVERBECK (*1755-08-21 – †1821-03-09) en Esperanton de BERND HASECKE (*1928-12.29 – †2008-02-05).*

Arg-1000-2023 (2014-05-03 17:56:22)

*Esperantigis: Bernd Hasecke (*29.12.1928; Kirchstr. 17c, D-42553 Velbert, Germanio). S-ro Bernd Hasecke estis delegito de UEA. Li mortis la 5-an de Februaro 2008 laŭ reta informo de lia filo Jan Ulrich Hasecke, Schubertstr. 4, D-42791 Solingen, Germanio.*

Mi, Manfred Retzlaff, ricevis en 2008-03 tiun tradukon de s-ano Anton Kronshage, Eulenberg 27, D-58332 Schwelm, Germanio, tel. 0049-(0)2336-12091.